Bulteno de la **Londona Esperanto-Klubo** 2014 januaro-februaro

*Feliĉan Novan Jaron al ĉiuj anoj kaj geamikoj de la Londona Esperanto-Klubo!*

## Grava anonco pri la Novjara Festo!

Por ke oni pli bone preparu la feston, bonvolu informi Terry Page (01908 564004) antaŭ la 9a de januaro se vi esperas veni. Se neniu respondos, bv. registri per la respondilo vian mesaĝeton. La konsilantaro invitas al membroj donaci surloke iom da mono, por tiel partpagi la iom altajn kostojn de trinkaĵoj ktp.

## Kluba Programo:

**januaro:**

3 Nenia kunveno

10 Novjara Festo

17 Kadre de JEB-renkontiĝo (komenca programero) Saŝa Kovjazina: *Impresoj pri E-renkontiĝoj dum 2013* (1800h: konsilantaro)

24 Klubanoj: *5-minutaj Prelegetoj – Decidaj momentoj en la vivo* aŭ *Interesa evento dum vojaĝo*

31 John Wells: *Lingva Seminario*

**februaro:**

7 Socia Vespero

14 Arturo Prent: *La Komunumo "Whiteway" kaj Gassy Marin* (vidu noton malsupre) (1800h: konsilantaro)

21 Ludvespero

28 John Wells: *Lingva Seminario*

**marto:**

7 Socia Vespero

28 Jarkunsido

**Noto pri la prezento en 14 februaro:**

La Komunumo "Whiteway" (en Glosterŝiro) originis kiel kreaĵo de anarkiistoj. Ĝia jura situacio estas eble unika. Esperantisto Gassy Marin longe tie loĝis kaj dum tiu periodo li faris 10 jaran mondvojaĝon.

## LEKanino honorigita fare de UEA



En la pasintjara oktobra numero de *Esperanto* (oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio) aperis rubriketo sub titolo "UEA diplomis 12 elstarajn agantojn". Estis listigitaj dek du nomoj de esperantistoj "kiujn la Estraro de UEA honorigis per Diplomo pri Elstara Agado aŭ per Diplomo pri Estara Arta Agado." Unuavice en tiu listo staras la nomo de Grietje Buttinger, londonanino kaj dumlonga LEK-membrino, kiun oni tiel honorigis "pro gastigado de esperantistoj dum pluraj jardekoj."

Kvankam tio anonciĝis jam dum la ferma solenaĵo de la Universala Kongreso en Rejkjaviko, tamen ne eblis tie transdoni la diplomon al Grietje, ĉar ŝi ne ĉeestis. Estis do decidite, ke alia LEK-ano, nia vicprezidanto John Wells, transdonu ĝin al ŝi en la nomo de UEA, kies Estraron li prezidis inter 1989 kaj 1995. La ceremonio okazis enkadre de kluba Zamenhofa Vespero, la 13an de decembro 2013.

Ni varme gratulas kaj dankas al Grietje, kiu per sia gastigemo ebligadis, ke centoj da esperantistoj pasigu iom da tempo en Londono kaj, se ili tion deziras kaj dato oportunas, vizitu la Londonan Esperanto-Klubon.


*(Terry Page)*

*Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 21a februaro por mencio en la sekva Kluba Bulteno.*

## Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere ĉe Londona Irlanda Centro. Antaŭ la ĉefprogramero kaj dum la paŭzo klubanoj kutime amasiĝas en la komforta enirhalo por kaftrinki kaj babili.

Kutima programo:
18:00 malfermiĝo kaj benvenigoj
19:15 – 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero
20:15 – 20:45 paŭzo
20:45 – 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la ĉefprogramero
22:00 fino




Loko: London Irish Centre,
50-52 Camden Square, NW1 9XB
(tel: 020-7916 7272)
Metrostacio: Camden Town
Fervojo *London Overground*: Camden Road
Busoj: 29, 253, 274, 31.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.
Kluba retejo:
http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895; Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346 rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo 020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.
Federacioj: Orienta: John Redgwell, 17 Dover Close, Braintree, Essex CM7 5TD; Sudorienta: Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB 01932-345779 yarrump@gmail.com.

## Letero de nia Prezidanto



Karaj Klubanoj:

Jen venas nova jaro – kun esperoj por novaj spertoj, por novaj vizaĝoj kaj por novaj atingoj. Unu nuna atingo estas tio, ke la Sociaj Vesperoj iĝas pli viglaj. Pli da homoj ĉeestas ilin kaj pli diversaj iĝas la temoj. Bone por ĉiuj.

Alia tereno de antaŭeniro okazas sur la tereno de korespondado: Pli da retmesaĝoj venas de vojaĝontaj samideanoj, kiuj volas viziti la Londonan Klubon. Preskaŭ ĉiun semajnon aperas unu-du novaj anoncetoj, ke iu eksterlandano intencas renkonti Esperantistojn ĉe LEK. Denove, bone por ĉiuj.

**MATT PEPERELL** certe helpas multe, per siaj rekomendoj pri instruaj retejoj – kiuj estis por iuj el ni nekonataj – kaj ankau per teknikaj konsiloj pri ttt-aferoj ĝenerale. Alia fulmrapida progresanto, **DANIEL HAYON**, pensigas LEKanojn per siaj gramatikaj rimarkoj kaj demandoj, kiuj estas nuancplenaj. Dankojn al ambaŭ anoj, ĉar mi mem certe bezonas tiajn refreŝigojn je mia propra lingvo-uzado!

Parolante pri refreŝigoj: Nepre notu la datojn de la **NOVJARA FESTO** kaj de la **KLUBA JARKUNSIDO**. Ne nur ĉeestu, sed plenanime partoprenu ambaŭ. Venu al la Festo por dividi ĝojon; venu al la Jarkunsido por dividi ideojn. Venu al ambaŭ por revidi geamikojn kaj revigligi vian Esperanton. Venu, ĝuu kaj revenu!

Feliĉan Novjaron,

*David Thornell*

### Esperanta Kalendaro:

17-19 januaro: Vintra Renkontiĝo de JEB en Londono (vidu 17 jan). komitato@jeb.org.uk, 07535 610126 (Saŝa Kovjazina)
18-20 aprilo: Brita Kongreso de Esperanto, *The Circle*, Sheffield www.britakongreso.org
26 julio-2 aŭgusto: 99a Universala Kongreso, Bonaero, Argentinio http://uea.org/kongresoj

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honoraj Vicprezidantoj: Valerie Atkinson, Husejn Al-Amily; Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Terry Page (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Matt Peperell, Michael Sims, Antony Rawlinson (Program-sekretario kaj Bultenisto).
Adresoj: David Thornell: Esperanto, c/o London Irish Centre (adreso supre) lek-sekretario@gmail.com;
Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ ap_esp-lek21@yahoo.co.uk,
Terry kaj Anica Page:7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry_page@btinternet.com, anica_page@btinternet.com,
Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.